

## & Bona negoco:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 271 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

### (#Melodio:

<1,5:31> (

/mi mi dore mi mimi mimido re fa;fa mimimi mimimi mimido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mi3re doTi La; So3mi mimi re do))×9 )+

### (&Strofoj:

'1 /En sukeraĵejon sinjoro eniris. ; "Mi torton deziras" rapide li diris.

(×: **En la ĉen' ; Dancu nun trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas ; Jen en amika ĉen' ; Dancu nun trankvile.**)

'2 Vendisto rapidis kaj ĉion aranĝis, ;  
Sed sian deziron la viro nun ŝanĝis: .....

'3 "Reportu la torton kaj donu do vi ;  
Porcion da krem-glaciaĵo al mi!" .....

'4 Manĝinte la viro foriri tuj volis, ; Sed  
jen la vendisto admone parolis: .....

'5 "Pardonu, sinjoro, vi ne jam ĝin pagis!" ; "Ĉu pagi?" li diris; "mi juste ja agis: .....

'6 Mi manĝis ja nur glaciaĵon ĉe vi ;  
Kaj donis porcion da torto por ĝi." .....

'7 "Vi estas ja prava; vi tiel ja agis. ;  
Sed tamen: Vi ankaŭ la torton ne pagis!" .....

'8 Sed nun la sinjoro treege ekmiris, ;  
Kaj al la vendisto kolere li diris: .....

'9 "Ĉu pagi la torton? Ĉu mokas vi min? ; Mi ĝin ja redonis! ; Ne manĝis mi ĝin!" .....